Bulteno de la
Londona Esperanto-Klubo
londona esperanto klubo.com
Septembro - Oktobro 2026

Kluba programo

Septembro

4. **UK 2027 en Melbourne, Australio** de Sandor Horvath & Helen Palmer.

11. **Via somero en Esperantujo** ĉeeste en Highbury.

18. **Kongresaj raportoj** fare de ĉeestantoj diversaj.

25. **Grenproduktado sur la Planedo**, Evgen Kovtonyuk.

Oktobro

2. **Temo decidota**.

9. **Ni ludu "Tabuo!" + ??** ĉeeste en Highbury.

16. **John Lennon kaj Ludoviko Zamenhof** fare de Jolanta.

23. **La kaptito de Neustrelitz** de Ralf Glomp.

30. **Kvantoj kaj nombroj en diversaj lingvoj**, Philippe Planchon.

Esperanto is a neutral, international language, and a global community. Turn to the back page to get started.

Retaj Esperanto-kursoj!

En septembro, LEK denove lanĉas siajn popularajn retajn Esperanto-kursojn, kiuj jam fariĝis konstanta rendevuejo por lernantoj el la tuta mondo. La listo de novaj kursoj estis anoncita meze de aŭgusto kaj jam pli ol 110 lernantoj aliĝis ĝis nun.

Ĉi-foje estas lanĉitaj dek unu trimonataj kursoj por niveloj de tutkomencantoj ĝis progresintoj. La plena priskribo de ĉiu kurso troveblas en la retejo kursaro.net. Inter la novaj proponoj estos ankaŭ unulingva kurso por tutkomencantoj! Ekde la unua leciono, la instruisto, Peter Weide, parolos al la lernantoj nur en Esperanto. Tio signifas, ke ne gravas la nacia lingvo de la studentoj: ĉiuj povas partopreni.

Ĉiu kurso okazas rete per Zoom unufoje semajne dum unu horo, kio ebligas partoprenon sendepende de loĝloko aŭ horzono. La partoprenantaro estas vere internacia: kutime pli ol 120 lernantoj aliĝas al la kursoj (kompreneble, aŭ bedaŭrinde, ne ĉiuj ĉeestas ĉiun lecionon), kaj la plej multaj venas el Usono kaj Eŭropo. Tamen troviĝas ankaŭ kelkaj en Azio kaj Aŭstralio.

La instru-teamo mem spegulas tiun internaciecon: du instruistoj loĝas en Usono, kvin en Britujo, kaj la aliaj en Germanujo, Danujo, Hispanujo kaj Nederlando. Ĉiuj kunigas altan lingvan nivelon kun vasta pedagogia sperto. Kelkaj el ili trapasis la plej altnivelan KER-ekzamenon (C2). Inter ili troviĝas eĉ du iamaj «Esperantistoj de la jaro» (Anna Lowenstein kaj Dennis Keefe) kaj, kompreneble, membroj de LEK (Anna Lowenstein, Rico Giacometto kaj Roberto Garcia).

La studperiodo finiĝos en decembro, sed la lernado ne haltos tie: novaj trimonataj kursoj komenciĝos en januaro. Por multaj lernantoj tiu kursaro estas ne nur maniero lerni nian lingvon, sed ankaŭ okazo fariĝi parto de tutmonda komunumo.

Do, aliĝu ĉe kursaro.net, invitu geamikojn kaj helpu, ke Esperanto daŭre ligu homojn trans lingvaj kaj landaj limoj.

Anthony Bodineau, kurs-organizanto

Murpentraĵo "Canterbury Tales" de Ezra Winter.

La Kanterberiaj Rakontoj

Ĉimonate eldoniĝis libro "Eroj el Kanterberiaj Rakontoj", esperanta traduko de partoj de *"The Canterbury Tales"* de Geoffrey Chaucer. Jen kiel redaktisto de la nova libro priskribas la verkon:

En aprila mateno grupo da pilgrimantoj ekrajdas laŭ la vojo de Londono al la urbo Kanterberio. La pilgrimantoj kovras preskaŭ la tutan gamon de la mezepoka angla socio, de la Kavaliro kaj Priorino ĝis la Muelisto, Plugisto kaj Kuiristo. Por pasigi la tempon ili interkonsentas, ke ĉiu el ili regalos la aliajn per iu rakonto.

La verko estas el la plej gravaj verkoj en la angla lingvo, tamen "la angla lingvo" ne estas taŭga termino ĉi tie. Verkita inter 1387 kaj 1400, la verko estas en la "meza angla" lingvo, la antaŭa formo de la nuna lingvo. La rakontoj estas kaj bonaj ekzemploj de tiu antaŭa lingvo, kaj granda influo al la evoluo de la angla lingvo. Eblas ke la rakontoj parte respondecas pri tio ke uzo de angla lingvo iĝis kutima en literaturo, anstataŭ la franca aŭ la latina.

Spertuloj taksas ke dum 1000 jaroj lingvo emas ŝanĝiĝi sufiĉe por ne plu esti komprenebla al antaŭaj uzantoj. Ĉi tio videblas en la lingvo de la rakontoj. Nuntempaj anglalingvanoj pli ofte legas tradukon, ne la originalan tekston, eĉ se tiu traduko estas ankaŭ nome en la angla. Jen eltiraĵo el la originala teksto por montri la lingvon de tiu epoko:

'Wepyng and waylyng, care and oother sorwe // I knowe ynogh, on even and a-morwe,' // Quod the Marchant, 'and so doon oother mo // That wedded been.'

Notindas ke en tiu tempo oni prononcis la plimulton de la literoj, do eĉ se ĝi estas nekomprenebla, ĝi estu eldirebla!

La formo de la rakontoj spegulas realan kutimon de la tempo de kiam ĝi venas. Tre ofta ŝatokupo estis kunveni por rakonti, kaj nature estas ke aro de pilgrimantoj farus tion dum vojaĝo. Grupoj de homoj kuniĝis en *pui*-oj, societoj por artemuloj, ĉe kiujn oni venis por rakonti, deklami poeziojn, aŭ muziki. Iu "mastro" donis premion al la plej bona, kaj tio ankaŭ estas la plano en La Kanterberiaj Rakontoj: Pro la plej bona rakonto la rakontinto ricevos senpagan tagmanĝon.

En la verko, la rakontojn rakontas diversa grupo, el pluraj socio-niveloj, kaj kun pluraj opinioj. La fontoj de Chaucer ankaŭ estis diversaj. Laŭ kutimo de tiu tempo, ne ĉio estis tute originala. Chaucer estis parto de literatura mondo de ne nur Britujo sed ankaŭ Eŭropo. Li, kiam diplomatiisto, vizitis Italujon en 1372, kie li verŝajne konis "La dia komedio" de *Dante*, el kiu eble venis inspiro pri pilgrimantoj. Eblas ke li en Italujo renkontis *Petrarch* aŭ *Boccacio*, gravulojn de la itala renesanco. Liaj roluloj, malgraŭ socia rango, estas lertaj pri lingvo kaj rakontado, kiel esperis renesancaj pensistoj.

Phil Housley



Chaucer en Esperanto

Eroj el La Kanterberiaj Rakontoj de Geoffrey Chaucer, trad. W.B. Johnson, John Wells, William Auld kaj Tom Fraser. Red: Anna Lowenstein kaj Edmund Grimley Evans. EAB, 2026. ISBN: 978- 0902756960

Pluraj esperantistoj dum la lasta jarcento tradukis iujn el la rakontoj kaj ankaŭ la Prologon, en kiu aperas prezento de la diversaj roluloj. En ĉi tiu ĵus aperinta eldono de EAB aperas kvar eroj el tiu eksterordinara verko, tradukitaj de W. B. Johnson, John Wells, William Auld kaj Tom Fraser. La tradukoj aperas paralele kun la originala teksto, tiel ke legantoj povu kapti impreson pri la angla lingvo de la 14-a jarcento, kaj mem deĉifri ĝin per la helpo de la Esperantaj tradukoj.

Du membroj de LEK kontribuis al la aperigo de la traduko. Anna Lowenstein (kune kun Edmund Grimley-Evans) redaktis la tekston, dum unu el la rakontoj estis tradukita de nia honora prezidanto John Wells. La libro estas aĉetebla de Amazon. Prezo: £10.

Anna Löwenstein

Venontaj programeroj

Plena programo rekomenciĝas ĉimonate, post la somera paŭzo. Nia unua ĉeesta kunveno en Highbury je la 11a de septembro havas rilatan temon: "Via somero en Esperantujo". Ĉi tiu okazo estos por ke iuj prezentu siajn lastatempajn esperantajn aktivecojn, kaj ke ni babilu pri ili. Se vi ĉeestis kongreson, aŭ faris ion ajn esperantecan, ni petas ke vi venu kaj parolu al ni pri tio.

Je la dua ĉeesta kunveno, en oktobro, ni ludos. Rico sugestas la ludon Tabuo, en kiu oni devas igi ke teamanoj diru iun vorton, sed oni devas fari tion sen uzi tabuajn vortojn. Ĝi povas esti bona testo de lingvaj povoj!

La virtualaj kunvenoj de septembro komenciĝas pri esperantaj temoj. Ni aŭdos pri la UK de 2027, kio okazos en Melbourne (Melburno) en Aŭstralio, kaj ni aŭdos pri lastatempaj kongresoj dank' al tiuj kiuj partoprenis ilin.

Poste en la programo ni transiros al pli diversaj temoj. Je fino de septembro Evgen (Eŭheno) Kovtonyuk parolos pri produktado de greno. Eŭheno estas spertulo en la kampo de grenproduktado. Li diplomiĝis ĉe la Odesa Akademio de Manĝaĵaj Teknologioj (Ukrainujo) kaj ĉe la Universitato de Kansaso pri Grena Komerco (Usono). Li estis vicministro de la Ministerio pri Grenaj Produktoj de Ukrainujo (1993–1996) kaj Nacia delegito en la Internacia Grena Konsilio (IGC).

En oktobro, ni lernos respondon al demando "Kion komunan havis John Lennon kaj Ludoviko Zamenhof krom... okulvitroj?". La sekvan semajnon temos pri dramo, kun legado el teatraĵo de Ralf Glomp; "La kaptito de Neustrelitz" ricevis premion ĉe Belarta Konkurso 2026 en Graz.

La 30an de oktobro ni revenos al lingva temo, pri kvantoj kaj nombroj en diversaj lingvoj. De Philippe Planchon: "Ĉu ekzistas aliaj manieroj nombri aŭ esprimi kvantojn? Ĉu tiuj manieroj estas ligataj al la homaj kulturoj, al lingvaj apartaĵoj aŭ al propraĵoj de la naturo? Tial ni konsideros la malsimplajn rilatojn inter nombroj, kvantoj, vortoj, kaj simboloj por respondi tiun demandon."

LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO

Ĉu ni traduku ion kune?

Mi proponas ideon kion mi havas ekde antaŭ longe, sed kiu neniam iĝas plano. Ĉu estus amuza traduki ion grupe? Ofte kiam mi tradukas mi volas havi opinion de aliulo, kaj mi pensas pri ĉu tio povus esti bona lerniga sperto por mi kaj aliaj.

Mia nuna ideo estas ke malgranda grupo povus kunveni regule, aŭ ĉeeste aŭ virtuale, kaj diskuti tekston tradukante ĝin. Ĝi ne estus leciono, kaj mi ne provus instrui; celo estus kune fari ĉion.

Ĝis nun mi ne elektis tekston, ĉar mi pensas ke komuna konsento pri tio estas pli grava ol la elekto mem. Estas iuj tekstoj kiujn mi volas iam traduki, inkluzive de romano, sed elekti ion tiom longa povas esti malalloga, ĉu ne? Ideo de Anthony estas ke ni regule traduku ion mallongan dum niaj ĉeestaj kunvenoj, kaj eble ion pli longan en aliaj seancoj.

Se la ideo de traduki grupe ne ŝajnas al vi tute teda, bonvolu diri al mi kaj ni provos ion.

Phil Housley

Londona Esperanto-Klubo

La Londona Esperanto-Klubo (LEK) estas Esperanto-asocio en Londono (Britujo), kiu zorgas pri la disvastigo de Esperanto en Londono kaj organizas kulturan vivon por la komunumo parolanta Esperanton en Londono kaj ĉirkaŭe.

Lokoj kaj horaroj

LEK kutime kunvenas vendrede vespere. Kunvenoj je dua vendredo de monato estas surlokaj kaj okazas en nia kunvenejo en Highbury. Kunvenoj komenciĝas je 19.15h. Aliaj surlokaj kunvenoj okazas de tempo al tempo - por scii pli pri tiuj, bv. viziti la paĝon de eventoj ĉe nia retejo. La ceteraj vendredaj kunvenoj okazas kutime en la interreto per la apo Zoom, kun komenc-horo je la 19a. Ĉiuj klubanoj kaj vizitantoj, proksimaj kaj foraj, do havas eblon partopreni en la kluba vivo.

Novaj spektuntoj de la interretaj kunvenoj povas peti ligilon al sekva Zoom-renkontiĝo en tiu ĉi paĝo: londonaesperantoklubo.com/zoom.

Nia kunvenejo

La kunvenejo troviĝas ĉe:

Highbury View
89 Ronalds Road
London
N5 1XQ

La ejo estas facile atingebla de la metrostacio Highbury & Islington. Temas pri pli-malpli 10-minuta piedirado. Atentu, ke **por eniri la ejon, oni bezonas enirkodon**. Se vi ne konas ĝin kaj intencas ĉeesti, bv. kontakti nin per la kontakto-paĝo en nia retejo por havi la kodon.

Por ĝisdata informo pri kiel atingi Highbury View, oni povas konsulti la retejon de TFL ĉe tfl.gov.uk/plan-a-journey.

Kontaktu nin

LEK retejo

Telegramo

Esperanto?

Esperanto is a "bridge" between different language communities, and a global community in itself - there are Esperanto speakers on all continents, who support and learn from each other. Because it does not belong to any country, it is equal and neutral.

Esperanto was created by taking common features from existing languages, and uniting them with consistent rules that allow a small set of words to provide a lot of expression. It was designed to be easy to learn, but capable of expressing any idea. Compared to other languages, you can be fluent in Esperanto with much less study.

Here is the first article of the *Universal Declaration of Human Rights*, in English and in Esperanto, both from the UN's official translations.

Article 1 All human beings are born free and equal in dignity and rights. They are endowed with reason and conscience and should act towards one another in a spirit of brotherhood.

Artikolo 1 Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduti unu al alia en spirito de frateco.

Some quick facts:

- You will always know the type of any Esperanto word from its ending. If you want to use a word as a different type (e.g. turn a noun into an adjective) you can just change the ending.
- A word's core meaning never changes. Once you learn a word, you will always know what it means. Many words are built from other words - and if you need a word that doesn't exist, you can make it.
- If you want to learn about grammar, Esperanto will make it easy. But if you don't want to, you don't need to. Everything in the language means something, nothing is there just for grammatical reasons.

To start learning now, here's a website which will give you a tour of the language very quickly, and then offer some ideas about how to continue. One of the best ways is by joining the courses given by the London Esperanto Club.

unua.leciono.org

Se vi volas kontribui ion al la Bulteno, bonvolu kontakti Phil aŭ la klubon. Troviĝas formularo ĉe la kluba retejo se vi ne scias kontaktdetalojn.